WIKIPEDIA

Japana lingvo

La **japana lingvo** (japane 日本語 [Nihongo] aŭskulti) estas la nacia lingvo de Japanio, de nekonata origino. Ĝia karaktero montras simplan fonologion, tre malsimplan esprimaron pri respekto kaj mildeco, kaj vortordon SOV kun postpozicioj.

Japana lingvo	
日本語 [Nihongo]	
Parolata en	Japanio
Parolantoj	127,000,000
Skribo	Miksaĵo de la Ĉina skribo kun du ĉin-derivitaj silabaroj
Lingvistika klasifiko	
Japana	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Japanio
Reguligita de	Kokugo Shingikai, Council for Cultural Affairs
Lingva statuso	1 sekura
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ja
ISO 639-2	jpn
ISO 639-3	jpn
SIL	JPN
Glottolog	nucl1643
Angla nomo	Japanese
Franca nomo	japonais
Vikipedio	

Enhavo

Parencoj kaj origino
Fonetiko
Vokaloj
Konsonantoj
Gramatiko
Vortprovizo
Skribo
Ekzempla teksto
Japandevenaj Esperantaj vortoj
Organizoj
Triviale
Referencoj
Vidu ankaŭ
Eksteraj ligiloj
Literaturo

Parencoj kaj origino

La sola konata parenco de la japana estas la *rjukjua* (Ryūkyū) lingvo, parolata en la Rjukjuaj Insuloj sudokcidente de la ĉefaj insuloj de Japanio kaj ofte rigardata kiel dialekto de la japana. La rjukjuaj dialektoj estas pli-malpli interkompreneblaj inter si, sed kune ekdisiĝis el la prajapana antaŭ unu ĝis du mil jaroj, kaj ne plu estas interkompreneblaj kun la norma japana. Tamen, la rjukjua neniel lumigas la praoriginon de la prajapana, kiu restas plu mistera.

Fonetike la japana similas al la Pacifikaj lingvoj kiaj la samoa aŭ la malaja, kio videblas ekzemple ĉe la malmultecon de vokaloj, sed gramatike ĝi similas plie al la altajaj lingvoj, kiaj la korea aŭ la mongola, kio videblas ekzemple ĉe la vortordo aŭ la postpozicioj. Por kongruigi ambaŭ hipotezojn, aperis tria skolo kiu proponas, ke dekomence loĝis en Japanio popolo kun sudmara lingvo kaj poste ĝi estis invadita de popolo kun altaja lingvo. Ĉiukaze grava elemento kiu estas la vortotrezoro rilatas al neniu relative proksima lingvo.[1]

Fonetiko

La bazon de la japana fonologia sistemo bone modelas la kana-skribo (vidu supre), kiu notas silabojn konsistantajn el konsonanto kaj vokalo. Aldone ekzistas la silabferma ん (n).

Ankaŭ sola vokalo sen konsonanto povas konsistigi silabon.

Pri la prononco estas regionaj diferencoj interne de Japanio.



Vokala trapezo de la japana lingvo

Vokaloj

Simile kiel Esperanto la japana havas kvinpartan vokalan sistemon; la kvin vokalojn oni laŭ IFA transskribas kiel /a/ /e/ /i/ /o/ /ɯ/. La unuaj kvar estas similaj al la esperantaj, sed /a/, /e/ kaj /o/ havas ferman kaj malferman variaĵon depende de la longeco. La sonon /ɯ/ oni produktas prononcante "u" sen rondigi la lipojn.[2]

Konsonantoj

La konsonantoj, kiuj formas la unuan parton de la silaboj, estas principe 14, sed ne ĉiu okazas kombine kun ĉiu vokalo. Aldone ekzistas moligitaj variaĵoj kun "j"-sono inter konsonanto kaj vokalo, tamen nur kun la vokaloj /a/, /o/ kaj /u/, kaj ne kun la konsonantoj *ŭ* kaj, evidente, *j*. La kombinoj "ji" kaj "je" ne ekzistas, kaj "ŭ" ekzistas nur kombine kun "a" (わ = ŭa); signo por "ŭo" ekzistas (を), sed ĝi estas prononcata "o" kaj markas, kiel postpozicio, la akuzativon.

La vokaloj influas la prononcadon de la (antaŭa) konsonanto, ekzemple jene:

- Antaŭ "i" la konsonanto "s" estas prononcata kiel "ŝ" (sa / ŝi / su / se / so), kaj "t" estas prononcata kiel "ĉ".
- Antaŭ "u" la konsonanto "t" estas prononcata kiel "c" (ta / ĉi / cu / te / to), kaj "d" estas prononcata kiel "z".
- Antaŭ "u" la konsonanto "h" estas prononcata kiel "f" (ha / hi / fu / he / ho).
- Kaj tiel plu.

Tiaj apartaĵoj estas grava diferenco inter la transliteradsistemoj *Hepburn* (kiu notas ilin) kaj *Kunrei* (kiu ignoras ilin). Vidu malsupre ĉe skribo.

Gramatiko

La japana estas lingvo de la speco SOV (subjekto-objekto-verbo). Kutime por tia lingvo, ĝi havas neniujn prepoziciojn kiel la hindeŭropaj lingvoj sed postpoziciojn kiuj troviĝas post la modifato.

La substantivo ne fleksiiĝas, sed ĝin sekvas postpozicio por montri la frazrolon. Simile al la ĉina kaj la korea lingvoj, la plurnombro estas nedeviga.

La verbo fleksiiĝas laŭ finiteco, neeco, kaj mildeco. Adjektivoj en la japana estas stataj verboj.

Vortprovizo

La japana entenas multege da vortoj pruntitaj el la ĉina lingvo tra la jarcentoj.

Eĉ la bazaj numeraloj estas ĉinaj:

> *iĉi, ni, san, ŝi, go, roku, ŝiĉi, haĉi, kju, ĝu* (unu, du, …, dek)

Ili ekzistas paralele kun la indiĝenaj numeraloj:

> *hitocu, hutacu, miccu, joccu, icucu, muccu, nanacu, jaccu, kokonocu, to* (unu, du, …, dek)

Ekde la 16-a jarcento la japana pruntas vortojn ankaŭ el la eŭropaj lingvoj. Dekomence el la portugala kaj la nederlanda, kaj nuntempe precipe el la angla. La uzon de la angla kiel fonto de novaj vortoj helpas tio, ke de kelkaj jardekoj preskaŭ ĉiu japana lernanto studas la anglan dum kelkaj jaroj. Tial, angleca neologismo estas sufiĉe komprenata por fariĝi ofte uzata.

Eble pro la longdaŭra uzo de la ĉina skribsistemo, japanaj vortegoj kutime mallongiĝas al aĵoj de kvar moraoj: *pāsonaru konpyūta* (el angla "personal computer") → *pasokon*

Skribo

La japana skribiĝas per kvar (iomete ankaŭ kvin aŭ ses en specialaj cirkonstancoj) diversaj skribsistemoj:

- Ĉinaj signoj (*kanji*): signoj pruntitaj el najbara Ĉinio ekde proksimume la kvina jarcento. La ĉinaj signoj ofte prononciĝas plurmaniere, ĉar ili estis pruntataj kaj laŭ signifo, kaj laŭ sono, kaj por ĉindevenaj pruntvortoj. Inter 1981 kaj 2010 ĉiuj japanaj infanoj devis lerni 1945 normigitajn ĉinajn signojn; nun ili devas lerni 2136. Ankaŭ miloj da pliaj ekzistas. En 1946 Japanio reformis la signojn, ĝenerale simpligante ilian formon.
- Rondaj kanaoj (*hiragana*): signoj, kiuj reprezentas silabojn, aŭ pli precize *moraojn*. Ili baziĝas sur kursivaj formoj de ĉinaj signoj. Oni skribas per ili gramatikajn finaĵojn kaj postpoziciojn, kaj japanajn vortojn por kiuj ne ekzistas (normigitaj) ĉinaj signoj.
- Strekaj kanaoj (*katakana*): signoj, kiuj same reprezentas moraojn, sed kiuj baziĝas sur simpligitaj pecoj de ĉinaj signoj. La du kana-sistemoj nombriĝas je po 46 simboloj. Oni uzas strekajn kanaojn precipe por skribi moderntempajn pruntvortojn, fremdlingvajn nomojn, kaj onomatopeojn.
- Latinaj literoj (*rōmaji*): Oni ankaŭ povas skribi la japanan per la latina alfabeto. Tia skribo uziĝas precipe en dokumentoj, vojmontriloj, kaj lernolibroj por fremdlingvanoj. Ne ekzistas unusola ĉie-uzata latinliteriga sistemo. Tial uzi latinajn literojn senerare povas esti iom malklara afero. Ĉi tie prezentiĝas latinliterigo pli-malpli laŭ la oficiala sistemo Kunrei (japane 訓令, «direktivo») aŭ *Monbusyo* (japane 文部省, «kultura ministerio»), sed ankaŭ plejofte uzata estas la Hepburn-a sistemo. La sistemo Kunrei estas malofte uzata eĉ en Japanio, ĉar ĝi estas malfacile legebla por neparolantoj de la japana: ankaŭ la oficialaj retejoj de la japana registaro uzas la hepburnan. Tamen, Kunrei estas pli konciza ol la sistemo Hepburn, kaj tial estas ĝenerale uzata por klavarumado en la japana en komputiloj. La vorto «mi» estas skribita *watashi* laŭ la sistemo Hepburn, kaj *watasi* per la latinigo Kunrei, kaj prononciĝas ŭataŝi.
- arabdevenaj nombrosimboloj, sed la japana skribo ankaŭ uzas la ĉinan nombrosimbolaron.
- grekaj literoj estas troveblaj en la sciencoj kaj en formuloj. (Vidu ekzemple jenan artikolon el la japana vikio, kiu montras ĉiujn ses skribsistemojn kune uzatajn: http://ja.wikipedia.org/wiki/不確定性原理)

Ofte oni apudigas al maloftaj ĉinaj signoj silabajn kanasignojn por indiki la prononcon; tio nomiĝas *furigana*, speco de tipo ruby. Kun vertikala tekstdirekto, furigana kutime situas sur la dekstra flanko de la teksto, tamen kun horizontala direkto supere.

En la du kana-sistemoj la voĉajn konsonantojn *g*, *z*, *d* oni distingas disde la senvoĉaj *k*, *s*, *t* per duoblaj streketoj ĉe la supra dekstro de la kana-signo. *b* samamaniere distiniĝas de *h* (kiu en la antikva japana lingvo estis sono pli simila al *f*). *p* distingiĝas de *b* per anstataŭigo de la streketoj per cirkleto.

En la japana skribsistemo oni ne disigas vortojn per spaco, krom en libroj por infanoj kaj alilandaj lernantoj.

Vowels					Youon		
あ ア a	い イ i	う ウ u	え エ e	お オ o			
か カ Ka	き キ Ki	く ク Ku	け ケ Ke	こ コ Ko	きゃ キャ Kya	きゅ キュ Kyu	きょ キョ Kyo
さ サ Sa	し シ Shi(Si)	す ス Su	せ セ Se	そ ソ So	しゃ シャ Sha(Sya)	しゅ シュ Shu(Syu)	しょ ショ Sho(Syo)
た タ Ta	ち チ Chi(Ti)	つ ツ Tsu(Tu)	て テ Te	と ト To	ちゃ チャ Cha(Cya)	ちゅ チュ Chu(Cyu)	ちょ チョ Cho（Cyo）
な ナ Na	に ニ Ni	ぬ ヌ Nu	ね ネ Ne	の ノ No	にゃ ニャ Nya	にゅ ニュ Nyu	にょ ニョ Nyo
は ハ Ha	ひ ヒ Hi	ふ フ Fu(Hu)	へ ヘ He	ほ ホ Ho	ひゃ ヒャ Hya	ひゅ ヒュ Hyu	ひょ ヒョ Hyo
ま マ Ma	み ミ Mi	む ム Mu	め メ Me	も モ Mo	みゃ ミャ Mya	みゅ ミュ Myu	みょ ミョ Myo
や ヤ Ya		ゆ ユ Yu		よ ヨ Yo			
ら ラ Ra	り リ Ri	る ル Ru	れ レ Re	ろ ロ Ro	りゃ リャ Rya	りゅ リュ Ryu	りょ リョ Ryo
わ ワ Wa	ゐ ヰ Wi		ゑ ヱ We	を ヲ Wo			
				ん ン n/nn			

Jen la bazaj signoj de la ronda kaj la streka kanaaroj (kun latinliteraj prononcindikoj)

Ekzempla teksto

Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, artikolo 1: <すべての人間(にんげん)は、生(う)まれながらにして自由(じゆう)であり、かつ、尊厳(そんげん)と権利(けんり)とについて平等(びょうどう)である。人間(にんげん)は、理性(りせい)と良心(りょうしん)とを授(さず)けられており、互(たが)いに同胞(どうほう)の精神(せいしん)をもって行動(こうどう)しなければならない。

Transskribado Hepburn: *Subete no ningen wa, umare nagara ni shite jiyū de ari, katsu, songen to kenri to ni tsuite byōdō de aru. Ningen wa, risei to ryōshin to wo sazukerarete ori, tagai ni dōhō no seishin wo motte kōdō shinakereba naranai.*

Ĉiuj homoj (temo) denaske liberas kaj digno (kaj) rajto (kaj) (pri) egalas la homoj (temo) racio (kaj) konscienco (kaj) (akuzativo) estas donataj unu la alian frateca spirito (akuzativo) havante devas agi

Japandevenaj Esperantaj vortoj

aikido, animeo, bokeo, bonzo, cunamo, ĉanojo (tradicia te-ceremonio), daimio, eno, goo, hajko, harakiro (*harakiri*, honora sinmortigo de samurajo), haŝioj (manĝbastonetoj), hibakuŝo, ĵudo, kamikazo, karaokeo, karateo, katano, kimono, mangao, ninĵo, Nipono (sinonimo de "Japanio"), noo, origamio, sakeo, samurajo, sorobano, sudoko, sumoo, suŝio, sojo, ŝamiseno, Ŝinkanseno, ŝintoo, ŝogio, ŝoguno, tatamo, tankao, tofuo, tokusacuo, udonoj (nudeloj), utao, zorioj, zumioj.

Organizoj

La Japana Fondumo (japane **国際交流基金 国際交流基金**, *Kokusai Kōryū Kikin*, angle “Japan Foundation”) estas kultura institucio, kies tasko estas promocii kaj disvastigi la japanajn lingvon kaj kulturon en la mondo. Ĝi povas esti konsiderata kiel la japana ekvivalento de la germana Goethe-Instituto aŭ

la angla British Council.

Triviale

- En japana lingvo *dankon* signifas *peniso*. Kelkaj japanaj esperantistoj – specife virinoj – malŝatas diri la vorton, do ili anstataŭe diras *dankas*.

Referencoj

1. ↑ Por la tuta paragrafo vidu Naokazu Kawasaki, KELKAJ ASPEKTOJ DE LA JAPANA LINGVO. Esperanto, UEA, julio 1965.
2. ↑ Naokazu Kawasaki, KELKAJ ASPEKTOJ DE LA JAPANA LINGVO. Esperanto, UEA, julio 1965.

Vidu ankaŭ

- Klasika japana lingvo
- Japana Lingvo per Latinaj Literoj
- Transskribo de la japana lingvo en Esperanton
- Japanlingva literaturo
- Japanologio

Eksteraj ligiloj

- La ortografio de japana lingvo (http://homepage1.nifty.com/ishato/esp/ortograf.htm)
- AKSER Brazilo - Japana Lingvo - Video (http://www.shotokai.com.br/akser-curso-de-japones.html)
- kanaoj Copybook (PDF) (http://brng.jp/50renshuu.pdf)

Literaturo

- *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1993/09, paĝo 20: *La japana* verkita de Bradley Kendal.
- *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1994/10, paĝo 21: *Du ortografioj* verkita de Yamasaki Seikô.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Japana_lingvo&oldid=6953785"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 18:04, 4 maj. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.